


# Kronvirusa malliberejo

**Ĝi aspektas kiel sciencfikcia filmo: la ŝtato enfermas siajn civitanojn en "kvarantenajn malliberejojn" kaj permesas al si submeti ilin al medicinaj esploroj kiel diversaj elprenaĵoj, kaj radiografioj : tio estas alarma realaĵo de la ŝtata gvatado de la korpoj kaj de la libereco de la civitanoj en la tuta mondo.**

La Apelacia Kortumo en Lisbono Portugalio juĝis necese protekti la fundamentajn rajtojn de la civitanoj kaj deklaris kontraŭleĝa la kvarantenon de kvar portugalaj plendantoj, kvankam unu el ili havis pozitivan PCR-teston ; kontraŭe en aliaj landoj eŭropaj kaj en la tuta mondo, civitanoj devas esti vere enŝlositaj hejme - eĉ sen PCR-testo. Nuntempe la politiko trudas striktajn limigojn al kontaktoj, kaj krome ĝi forte instigas civitanojn sin izoli. Tiel Christian Drosten virologo de la Charité en Berlino rekomendis kvin-tagan memizoladon, por "ne riski", jam en la okazo de etaj signoj de Kovid-19 kiel dorsdoloro aŭ kapdoloro.
Cetere, kelkajn semajnojn antaŭ la kristnaskaj festoj rekomendo pri Kovid-19 admonis ĉiujn sin prepari, pere de "memizolado" se eble plurajn tagojn antaŭe. La temo de izolado kaj kvaranteno estas ĉiea en politiko kaj amaskomunikiloj : rekomendoj, postuloj kaj rememorigoj. Tamen la principo de libervola izolado estas delonge forlasita, ĉar oni vidas, ke pli kaj pli multaj registaroj enfermas en kvarantenejoj supozeble infektitajn personojn aŭ suspektindajn kontaktopersonojn, ĉar hejme ili povus infekti kunloĝantojn aŭ vizitantojn. Ekzemple en Nov-Zelando, jam printempe 2020, la koncernitoj estis perforte metitaj en transformitajn konstruaĵojn, kiel kongresejoj, hoteloj kaj stadionoj. En tiuj veraj malliberejoj provizoraj, ĉiu agado estas kontrolata, ĉiu objeto estas vana kaj neniu advokato povas helpi. La minimuma du-semajna "aresto" finiĝas nur en okazo de bona konduto; homoj, kiuj rifuzas la teston, estas devigitaj resti enfermitaj pli longe. Tamen, inter la 28a de februaro kaj la 15a de septembro 2020, Nov-Zelando registris nur 22 (!) supozatajn mortojn pro Kovid-19, meznombre 3 (!) monate. Kaj tamen ne nur en Nov-Zelando troveblas tiaj "kvarantenaj malliberejoj" sed ankaŭ en Ĉina Popola Respubliko, Hindio, Nepalo, Grekio (sur la insulo Lesbo) kaj Usono. En marto 2020, Vjetnamo transformis 145 hotelojn en arestejojn por "infektitaj" homoj. Tiuj lokoj ofte estas mizeraj kaj deprimaj.
Rapide kaj draste kreskas la socia malakcepto de homoj, kiuj ne submetiĝas senkondiĉe al la diktaĵo de Kovid 19. Ili estas fimarkitaj kaj persekutataj, kio ofte kaŭzas panik-atakojn kaj depresion. Se ni ne vekiĝos nun kaj ĉesigos tiun disvolviĝon, estontaj generacioj miros kaj scivolos, kiel tiaj faloj povis okazi sen tumulto tra la tuta nacio.

**de ol./abu.**

## Fontoj:

https://www.rubikon.news/artikel/der-corona-knast

**Ankaŭ tio povus interesi vin:**

#Kronaviruso - www.kla.tv/Kronaviruso

#PolitikoEU - www.kla.tv/PolitikoEU

#KompletaGvatado - gvatado - www.kla.tv/KompletaGvatado

**Kla.TV – Novaĵoj alternativaj ... liberaj – sendependaj – necenzuritaj ...**

- Tio kion la amaskomunikiloj devus ne kaŝi ...
- Tio pri kio oni aŭdas malmulte, de la popolo por la popolo...
- Regulaj informoj ĉe www.kla.tv/eo

Indas resti ĉe ni!

**Senpaga abono al nia retpoŝta informilo ĉi tie: www.kla.tv/abo-en**

**Sekureca Avizo:**

Kontraŭaj voĉoj bedaŭrinde estas pli kaj pli cenzuritaj kaj subpremitaj. Tiom longe kiom ni ne orientiĝas laŭ la interesoj kaj ideologioj de la gazetara sistemo, ni ĉiam sciu, ke troviĝos pretekstoj por bloki aŭ forigi Kla.TV.

**Do enretiĝu ekstere de interreto hodiaŭ! Klaku ĉi tie: www.kla.tv/vernetzung&lang=eo**

*Licenco:* *Licence Creative Commons kun atribuo*

Oni rajtas distribui kaj uzi nian materialon kun atribuo! Tamen la materialo ne povas esti uzata ekster kunteksto. Sed por institucioj financitaj per la aŭdvida imposto, ĉi tio estas permesita nur kun nia interkonsento. Malobservoj povas kaŭzi procesigon.